

VF-72443/52 (1983)

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

FELICAN NOVAN JARON

FAMILIO ZLATEV

NOVJARAJ KUTIMOJ

MIA VIVO KAJ ESPE-
RANTO

GLORAJ JUBILEOJ

LABORPLANO DE BEA
POR 1983

SI BRILOS KIEL
VERDA STELO

VINTRO, MONTARO,
SPORTO



Novjaraj kutimoj ce la bulgaroj



Grafikaĵo de Angel Angelov

Gajan, feliĉan Novjaron,
ruĝan pomon en ĝardeno,
oran spikon sur la kampo,
domon plenan de infanoj,
kaj al ĉiuj hejme sanon —
bene oni bondeziras.

La bulgara popolo bonvenigas la Novan Jaron per novaj esperoj pri prospero, sano kaj paco. Al la tradicioj hereditaj jam de la pagana tempo, la popola fantazio aldonis novajn elementojn, kiuj ornamis la kolorriĉecon de tiu ĝoja festo. La abunda manĝotablo estas plej grava — dum la novjara nokto oni ne dormas, manĝas bongustajn kuirajojn, trinkas plej bonan vinon kaj kantas gajajn kantojn. Tiu ĉi kutimo simbolas la esperon, ke la tuta jaro estos same tiel abunda kaj senzorga. Sed oni zorgas ne nur pri la abundeco de la manĝotablo — en la pasinteco en iuj vilaĝoj oni metis sub la tablo pajlon kaj tritikgrajnojn,

kiel esprimon de danko al la Tero pro ĝia fekundeco. Tiu ĉi kutimo simbolas ankaŭ la esperon, ke ĝi denove ĝojigos la homojn per abundaj fruktoj.

En noktomezo en urboj kaj vilaĝoj ekiras bele vestitaj infanoj kun butonkovritaj kornusbranĉoj enmane. Oni nomas ilin „Survakari“ kaj la kornusbranĉetojn — „Survaĉki“. Tiuj ĉi branĉetoj, laŭ malnova legendo, donas sanon, longvivadon kaj forton al la homoj. Tiel estas, ĉar la kornusarbo unua ekfloras sur la ankoraŭ neĝkovritaj montdeklivoj. La infanoj eniras ĉiun domon kiel plej karaj gastoj, frapetas per la florantaj branĉetoj ĉiujn hejmanojn kaj gaje, en popola versmaniero, bondeziras realigon de ĉio bona kaj dezirata de la dommastroj. Iuloke la „Survakari“ estas ne infanoj, sed junaj fraŭloj. Ilin akompanas sakflutistoj kaj guzlistoj, kaj anstataŭ la delikataj branĉetoj, ili kunportas bastonegojn, tamen el la sama kornusarbo. Unu el la rangoj estas anticipe dishakita, kaj en ĉiu domo, kune kun la bondeziroj ili lasas po unu lignero, kiu alportos feliĉon al la tuta familio. En la flamantan fajron de la fajrujo oni ĵeta. kornusbutonojn kaj kiom pli brue ili diskrevas kaj saltetas, tiom pli vivĝojaj kaj gajaj estos la infanoj en tiu ĉi domo. En la novjara nokto junulinoj alligas siajn fingroringojn al bukedo el bukso, lasas ilin kuŝi en akvo alportita de malproksime situanta fonto kaj frumatene elprenas ilin unu post la alia. La ceremonion plenumas tute juna knabineto sub travidebla vualo. La ceteraj, rondstarante, kantas ritajn kantojn pri feliĉa amo kaj pri baldaŭa edziĝo. Kaj laŭ la kanto, kiun ili kantas en la momento de elakvigo de la fingroringo, ili divenas kia estos la novedzo.

La novjara nokto estas dediĉita al la homaj espero kaj ĝojo, tial en tiu ĉi nokto la homo ne forgesas ankaŭ siajn silentajn helpantojn, la dombestojn, al kiuj li plej multe ŝuldas sian bonstaton. Post la gajaj rondodancoj kaj amuzoj, la dua tago estas dediĉita al ili.

La virinoj, preparante panon por la festo, preparas ankaŭ ritan panon, kiun oni poste disdonas al vaguloj kaj gastoj — por la sano de la bestoj. Oni orumas la kornojn de la bovoj, ornamas ilin per sekaj floroj kaj buksobranĉoj kaj tiel ornamitajn, oni solene kondukas la gregojn al la grandaj fontoj por trinkigi kaj surverŝi ilin. Ĉio ĉi estas akompanata de muziko, kantoj, amuzado kaj simbolas la dankemon de la mastroj al la bonanimaj, silentaj kaj fidelaj helpantoj de la homo.

Angel ANGELOV



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 52

JANUARO

1 • 1983

FELIĈAN NOVAN JARON!

Karaj legantoj

Karaj kunlaborantoj de „Bulgara Esperantisto“

Karaj gesamideanoj!

Dum la jam forpasinta 1982 la Bulgara Esperantista Asocio faris grandan utilan laboron sur ĉiuj kampoj. Estis sukcese realigitaj multaj organizaj kaj kulturaj aranĝoj. Kaj plej brila inter ili estis la celebrado de la 75-jara jubileo de BEA. Dum la solena sesio en Veliko Târnovo ĝia ĉiuflanka agado estis alte pritaksita de la bulgara registaro kaj de niaj amikoj-esperantistoj el alilando.

Ni povas fiere raportti, ke en 1982 realiĝis la malnova testamenta revo de la bulgara esperantistaro — Esperanto estas instruata kiel fakultativa lernobjekto en la bulgaraj mezlernejoj. Kaj dum 1982 ĉiuj spertaj E-lektoroj serioze kaj obstine laboris por urĝa preparo de E-instruistoj el la medio de la profesiaj instruistoj-filologoj.

Admirinda estis ankaŭ la aktivado de la bulgara MEM-sekcio — lastjare ĝiaj aktivuloj kolektis pli ol cent mil subskribojn por konservo de la paco kaj por malarmado, kaj tiuj ĉi subskriboj estis prezentitaj al la Speciala Sesio pri Malarmado de la Generala Asembleo de UN.

Dum la forpasinta jaro ankaŭ nia ŝatata revuo „Bulgara Esperantisto“ atingis sukceson — nun ĝi havas pli belan kaj modernan eksteraĵon kaj sur ĝiaj paĝoj oni povas legi pli multajn materialojn pri vere gravaj movadaj temoj.

Tre valoraj estis la materialoj de Nikola Aleksiev sub la rubriko „Heroa Pasinteco“. Valorajn materialojn publikigis Hr. Gorov, C. Murgin, D. Haĝiev, Iv. Esperov, Kr. Karucin. Bonaj estis ankaŭ la artikoloj de nia nova redaktoro Maria Jankova kaj de niaj regulaj kunlaborantoj el la distrikta E-societoj — Ivan Sivarov el Plovdiv, Olga Cankova el Veliko Târnovo, d-rino Tjuran Omer el Loveĉ, Elena Radenkova el Svoĝe, Boris, Kavalĝiev el Ruse kaj multaj aliaj.

Per originalaj kaj tradukaj verkoj sin prezentis sur la paĝoj de la revuo Simeon M. Simeonov, Penka Papazova Ljuba Bojaĝieva, Joanna Kraeva, Miĥail Ĉobanov.

Al ili ĉiuj la redakcio esprimas sian elkoran dankon! Ni kredas, ke pluraj novaj kunlaborantoj — ankaŭ el la vicoj de la plej juna generacio! — donos sian kontribuon por la plua prospero de „Bulgara Esperantisto“.

Ni sincere dankas ankaŭ al niaj kunlaborantoj el eksterlando — Oskar Stolberg el GDR, Adolf Holzhaus el Usono, Bernard Golden el Hungario, Parnas Sitonis, Andrej Rakov, J. Suvaĵev k. a. el USSR, kiuj gastis sur la paĝoj de nia revuo, esperante, ke ankaŭ estonte ili estos ĝiaj fidelaj amikoj.

Karaj amikoj, ni atendas viajn kontribuadojn! Skribu pri via ĉiutaga agado, pri la sukcesoj en la propagandado kaj instruado de Esperanto, pri la vivo de via junulara grupo, pri via kluba vivo kaj pri via nova klubeco, pri la historio de via loka E-societo kaj pri ĝiaj veteranoj kaj nunaj meritaj agantoj!

Kaj ne forgesu la du plej gravajn temojn, kiujn respegulos ĉi-jare nia revuo — la 100-jariĝon de la Internacia Lingvo en 1987 kaj la 60-jaran datrevenon de la Septembra Ribelo. Ĉiu, kiu posedas rarajn, unikajn informojn pri sia loka societo, pri la pasinteco de la bulgara aŭ la monda E-movado, nepre kontribuu! Bonvenaj estos ankaŭ informoj pri eminentaj personoj, kiuj lernis aŭ iamaniere estis ligitaj kun Esperanto kaj ankaŭ pri esperantistoj — partoprenintoj en la Septembra Ribelo en 1923.

Tamen — bonvolu ne forgesi nian plej gravan postulon — skribu klare kaj legeble, kaj ne pli multe ol du tajpitajn paĝojn!

Karaj amikoj! La Nova Jaro 1983 jam estas ĉe ni — kun siaj estontaj tagoj, kun niaj estontaj zorgoj, problemoj kaj esperoj.

Gi estu fruktodona, gaja, feliĉa kaj paca! — tia ĝin deziras milionoj da homoj en la mondo.

Feliĉan Novjaron!

100 jarojn Esperanto

LA PENETRO DE ESPERANTO EN BULGARION

1. La unuaj paŝoj de Esperanto en Bulgario (1887—1899)

La prabulgaroj venis al la Balkana Duoninsulo en la dua duono de la VII-a jarcento de la nova erao. Kune kun la slava loĝantaro, kiu estis liberigita el sub la bizanca jugo, ili fondis en 681 la unuan slavbulgaran ŝtaton. De tiu epoko ĝis nun forflugis pli ol 13 jarcentoj. La pli grandan parton de tiu periodo la bulgaroj pasigis sub fremda jugo. La unuan fojon en la komenco de XI-a jarcento Bulgario estis subigita fare de la bizancanoj kaj restis sub ties jugo (1018—1185) en daŭro de 168 jaroj. Duan fojon Bulgario estis okupita de la turkoj en daŭro de 485 jaroj. El sub la turka jugo Bulgario liberiĝis apenaŭ en 1878 rezulte de la rusa-turka milito (1877—1878). Do, ĉiu rajte supozus, ke la ĵus liberigita popolo ne estas fekunda tereno por disvastigo de internacia planlingvo, ĉar fakte la nemultnombra intelektularo estis ege engaĝita en solvado de diversspecaj internaj problemoj pri ĝenerala klerigo de la junularo, pri evoluigo de la kulturo, en administrado, en armeo ktp. Sed tiu supozo estas komplete erara.

La historio pruvis, ke la bulgara popolo ne staris flanke de la mondaj problemoj. Tio rezultas grandparte el la fakto, ke la tiutempaj bulgaraj naci-revoluciuloj havis firmajn kontaktojn kun progresemaj rondoj en eksterlandaj kaj precipe en Ruslando. La interesiĝo de la bulgara popolo pri radikala solvo de la lingva problemo estas rezulto ne nur de ties proverba lernemo, sed estis altrudita de la vivo mem. Sur la Balkana Duoninsulo ekzistis jam kelkaj novaj ŝtatoj kun malsamaj lingvoj. Iliaj senperaj kontaktoj estis grave embarasitaj pro manko de komune uzata lingvo. Antaŭ la liberiĝo de la balkanlandaj popoloj la turka lingvo estis tre disvastigita kaj havis sufiĉe vastan interpopolan uzadon, sed post la liberiĝo kune kun la disfalo de la turka milit-feŭda imperio la disvastiĝo de la turka lingvo rapidege reduktiĝis al nulo. En tiu komenca periodo de kreskantaj interrilatoj fare de la progresema intelektularo kun eksterlandaj amikoj aktualiĝis la problemo pri internacia planlingvo.

Jam en 1846 por unua fojo en la bulgara gazetaro oni ekparolis pri la internacilingva

problemo kaj ĉi tie solvo per planlingvo. Tiam temis pri starigo de komuna interslava planlingvo. En 1858 tiu problemo estis denove prilumita kaj en la periodo 1885—1887 komenciĝis sistema propagando, aperis gazeto en interslava planlingvo kaj vortaro en interslava-franca lingvoj.

Volapuko, la antaŭulo de Esperanto, aperis publike en 1879—1880. En la unuaj kelkajaroj ĝi havis sukceson nur en Okcidenta Eŭropo. Apenaŭ post la unua kongreso de la volapukistoj, okazinta en 1885, ĝi penetris en Orientan Eŭropon. La unua lernolibro (gramatiko) de Volapuko en Bulgario aperigis Krăstjo Ivanov Mirski, en Varno, 1886. Li pretigis malgrandan Volapuk-bulgaran vortaron kun 3000 vortoj, sed ĝi ne aperis. Laŭ la sama direkto agadis, multe pli serioze, Petăr Sapunov el Drjanovo. Li eldonis en 1889 kompletan lernolibron (gramatikon) de Volapuko kaj plenan Volapuk-bulgaran vortaron kun 14 000 vortoj. Tamen tiu sukceso evidentiĝis efemera. Post ne longe Volapuk pereis, senkompatate forlasita de siaj unuaj plej vervaj adeptoj, kiuj amase kaj senrezerve konvertiĝis al Esperanto.

Jam en la somero de 1887 iu(j) redakcio(j) de ĵurnalo(j) en Sofio, la bulgara ĉefurbo, ricevis (po) ekzempleron de Esperanto-lernolibro por rusoj rekte de L. Zamenhof. Germis fruktodone nur tiu ekzemplero, kiu venis en la manojn de Miloslav St. Bogdanov (1868—1914), kiu estante 19-jaraĝa junulo redaktis la gazeton „Bulgaraj Novaĵoj“, insiste pledante por ortofonetika skribo de la bulgara lingvo (1887). Post unu jaro, en la aŭtuno de 1888, pri Esperanto eksciis Nikola D. Kovačev (1867—1924). Ĥristo Popov kaj Georgi Kovačev eksciis pri Esperanto kaj eklernis ĝin en 1889.

Laŭ iniciato de M. Bogdanov estis fondita komence de oktobro 1889 la unua loka E-organizo „Esperantista Klubo de Sofio“. Ĝi estas laŭvice la tria E-organizo en la mondo post la volapukista „Mondlingva Klubo“ en Nurnbergo, kiu en decembro 1888 organizite konvertiĝis al Esperanto. Tion faris ankaŭ la Esperantista Klubo en Moskvo, fondita en junio 1889.

En septembro-decembro 1889 M. Bogdanov, en sia funkcio de prezidanto de la E-klubo en Sofio, entreprenis tre sukcesan varbkampanjon

por Esperanto. La **publicitaj artikoloj** kaj sciigoj estis miksaĵo **inter alvoko**, informo kaj reklamo. En ili Bogdanov, al la kleraj homoj kaj al la gelnantoj el gimnazioj en Bulgario, verve pledas por Esperanto, **asertante**, ke ties gramatiko estas „**ellernebla** en daŭro de unu horo“. „La nova internacia lingvo, skribas li, sukcesis en sia dujara ekzisto varbi 100-oble pli da adeptoj kaj amikoj en ĉiuj partoj de la terglobo ol sia pli aĝa kunfrato kaj konkuranto, la 9-jara Volapuko“. Bogdanov pacience klarigadis al la legantoj kiamaniere plenumi kaj sendi „Promeson“ al D-ro Esperanto pri preteco ellerni la Lingvon Internacian. En la fino de la artikoloj li reklamas pri la baldaŭ aperontaj bulgara Esperanto-lernolibro kaj dusemajna gazeto „La Mondlingvisto“ — organo de la Esperantista Klubo en Sofio.

En la fino de 1889 aperis la numeroj 1 (p. 1—54) kaj 2 (p. 55—64). En januaro 1890 aperis la n-ro 3 (p. 65—96) de „La Mondlingvisto“. Tiu gazeto estas la dua en la mondo post la Nurnberga „La Esperantisto“, kiu ekaperis en septembro 1889. Per „La Mondlingvisto“ Bulgario havis la unuan landan organon de la E-movado en la tuta mondo. En

1891 aperis „La Espero“ sub indiko jarkolekto II, n-ro 4, kiel daŭrigo de „La Mondlingvisto“. La unua lernolibro de Esperanto por bulgarioj estis eldonita de M. St. Bogdanov en februaro 1890. La E-klubo de Sofio estis transformita en landan organon sub la nomo Bulgara Internacia Societo „Espero“. La vorto „Internacia“ en tiu ĉi kazo estas uzita en senco de „Esperanta“. En la dua duono de 1891 estis fondita la dua loka E-organizo „Junulara Esperanto-Grupo“ en Koprivštica, kies sidejo estis la Legejo-Biblioteko de tiu urbeto. Ili lernis Esperanton per ruslingva lernolibro de L. Zamenhof. La iniciatoro estis Georgi Oreškov. Ekde 1893 la monata gazeto „Svjet“ („Mondo“), malavare malfermis siajn paĝojn por Esperanto. Ĝia redaktoro M. Kovačev fariĝis unu el la centraj figuroj de la bulgara esperantista movado dum la sekvontaj 15 jaroj. Nurnberga „La Esperantisto“ laŭdas en n-ro 3 de marto 1894 la gazeton „Svjet“ pro iu Kovačev-artikolo kaj konstatas, ke „inter la aliaj balkanaj ŝtatoj nur Bulgario distingigas per entreprenemo“ pri disvastigo de la Lingvo Internacia.

Canko MURGIN

(Sekvas en n-ro 2/1983)

LA FAMILIO ZLATEV

La bulgara familio Zlatev eniris la historion de la E-movado. Nikola Zlatev (1839—1916) estis adepto de la Internacia Lingvo. Li lernis unue Volapukon, sed en 1888 esperantistiĝis. En 1891 N. Zlatev fondis E-societon „Fulmo“ (la nuna „Lumo“) en Veliko Târnovo.

Lia patro Janaki Zlatev (1806—1882) studis medicinon en Ateno. En 1854 li sukcesis aketi apotekon de iu franca militista apotekisto. Li deziris interesigi sian solan filon pri farmacio. Sed Nikola revenis el Italio, kie li devis studi farmacion, kunportante multajn muzikinstrumentojn. Denove li devis veturi eksterlanden — en Konstantinopolon, kie li studis en medicinista lernejo.

Por siaj samurbanoj Nikola Zlatev estis nur posedanto de apoteko. Fakte Ignat Berger el Lvov (Pollando), aŭstra civitano, laboris kiel apotekisto. N. Zlatev estis sociaganto kaj dum pluraj jaroj — deputito en la Parlamento. La loka loĝantaro karese nomis lin „bona baĉo Koljo“ (baĉo en Esperanto fraĉjo), ĉar li monhelpadis ĉiun bonan ideon. En 1907 li donacis 100 orajn frankojn al la Bulgara Esperantista Ligo (Asocio) kaj estis elektita kiel ĝia honora membro.

Kiel muzikisto Nikola Zlatev komponis kantojn, nun tre popularajn. Li estis iniciatinto

de la Societo de Ĉasistoj kaj Fiŝistoj en Veliko Târnovo.



Nikola Zlatev (sidanta) kun siaj infanoj



Ilija Zlatev en uniformo de la iama bulgara sporta organizaĵo „Junak“ („Bravulo“) kun familianoj.

HEROA PASINTECO

MIA VIVO KAJ ESPERANTO

La komenco

En la aŭtuno de 1913 mi, malgrasa kaj sinĝena 14-jara knabeto, venis en Vraca el la malproksima vilaĝo Pripālĝene, distrikto de Miĥajlovgrad. Mi venis en la urbon por studi en la loka gimnazio.

En la loĝejo, kiun mi trovis, dum kelkaj jaroj (1899—1904) loĝis nia mondfama Esperantisto-pioniro Ivan Krâstanov el urbo Pirdop. Li estis forgesinta sian E-gramatikon kaj mi aŭtodidakte, dum mallonga tempo, ellernis la tute novan por mi lingvon. Mi estis kaptita de la facileco kaj la logikeco de tiu lingvo kaj mi konkludis, ke ĝi povus ludi gravan rolon en mia vivo.

Malgraŭ la militoj, kiuj tiutempe fermis la limojn inter la popoloj, mi komencis intensan korespondadon per la helpo de UEA en Genevo, kies delegito mi fariĝis. Unue mi skribis enlande al la tiama instruisto Stefan Minkov,

Nikola Zlatev kaj lia edzino Andoni havis tri filinojn kaj unu filon Ilija (1882—1944), kiu same estis esperantisto.

Kiel lernanto en la Knaba Gimnazio de Veliko Târnovo Ilija Zlatev esperantistigis kune kun sia samklasano Haralambi Băčvarov. En Ruse, kie la du amikoj lernis en la tiea Klasika Gimnazio, ili interparolis ĉiam en Esperanto. En 1902 I. Zlatev estis prezidanto de E-societo „Lumo“. Li membris en la Unua Bulgara Societo por Propagando de Esperanto en 1903.

Ilija Zlatev studis farmacion kaj samtempe filozofion en Vieno. En 1907 li estiĝis magistro-farmaciisto kaj membro de la Societo de Farmaciistoj en Vieno. Reveninte Bulgarion, li anstataŭigis la polan apotekiston en la patra apoteko. En 1910 li eldonis „Arkivojn de farmacio“. Ĝis la fino de sia vivo Ilija Zlatev aktivis en la E-movado kaj en la sporta societo „Junak“.

D-ro Panajot Hitrov kaj lia fratino Penka Hitrova, kiu laboris kiel apotekistino en la Apoteko Zlatev, estis amikoj de la familianoj de N. Zlatev.

En la granda familio Zlatev la tradicia intereso al Esperanto daŭras plu. Inĝ. Nikola Metodiev — nepo de Nikola Zlatev, estas esperantisto, kaj lia prapranepino Venelina — instruistino de muziko — nun lernas Esperanton.

Olga CANKOVA

kies akurata respondo entuziasmigis min. Pro tio mi skribis miajn sekvontajn tri leterojn ne al kiuj ajn „ordinaraj“ homoj, sed al rumana reĝino Maria (Karmen Silva), al princo el la eksŝaha familio Paĥlavi en Teĥerano kaj al eksministro Jokaŝi en Tokio. Ties neatenditaj respondoj ege ĝojigis min kaj mi definitive komprenis, ke Esperanto ne estas ludilo, sed serioza instrumento por interhoma komunikado kaj interkompreniĝo. Ekde tiam mi komencis daŭran kaj utilan korespondadon internacian kaj ekhavis multajn geamikojn, kompreneble, ne nur „grandulojn“, sed ankaŭ plej ordinarnajn homojn kiel mi.

Mi eĉ decidis instrui la lingvon, sed en la gimnazio la cirkonstancoj ne estis favoraj pro la kontraŭstaro de la instruistoj de franca kaj germana lingvoj. Tion mi provis fari ankaŭ en la Militlernejo, kie mi estis kadeto en



Radoslav Tričkov

1916. Malgraŭ la negativa rilato de la ĉefuloj al Esperanto, mi sekrete instruis la lingvon al grupeto da kadetoj, kiuj avide lernis kaj ekposedis ĝin, inter ili la proleta poeto Ĥristo Smirnenski (tiam kun pseŭdonimo Vedbal), la opereta artisto Asen Ruskov, la konata esperantisto Ivan Kotov kaj Radi Ovčarov el Stanimaka (nun Asenovgrad).

Post la Soldata Ribelo en 1918, kiam la Militlernejo ĉesis funkcii, mi fariĝis instruisto en elementa lernejo en vilaĝo Sumer, regiono Ferdinand (nun Miĥajlovgrad) nur por la 1919—1920 lernejararo. En 1919 okazis la Unua Kongreso de la Komunista Partio kaj mi fariĝis ties membro. Mi jam havis multajn gekorrespondantojn en la mondo, fakto, kiu instigis min vojaĝi, kaj mi decidis realigi tiun ĉi mian revon.

Tra la mondo per la Internacia Lingvo

Dum tri jaroj (1920—1923) mi sukcesis praktike konstati, ke Esperanto estas vere internacia helpilo en la multlingva vasto de la mondo. Per ĝi mi spertis la glacian spiron de polusaj landoj, la ardan kareson de Tropikoj, la vastajn senlimajn sablojn de la dezerto Atakama, la profundan, timigan silenton de la preskaŭ senhomaj Patagonio kaj Fajrolando (Tierra del Fuego). Unue mi celis Usonon, tamen, ne ricevinte vizon, mi haltis en Meksikio kaj de tie mi direktiĝis suden, vizitante Panamon, Venezuelon, Brazilon, Urugvajon, Argentinon, Ĉilion — ĉie akceptata, helpata kaj prizorgata de geesperantistoj.

En Argentino, kune kun la bulgara verkisto Boris Sivaĉev ni laboris unu jaron. En Buenos-Ajres ni laboris en diversaj industriaj entreprenoj, poste en la petrolaj putoj de Standart oil Company (Patagonio) kaj disiĝis por ĉiam, ĉar Boris grave malsaniĝis pro ftizo kaj mi decidis reveni Bulgarijon, kiu nostalgie vokis min.

Perŝipe mi vizitis la tutan okcidentan marbordon de Afriko kun ties landoj kaj en 1923, monaton antaŭ la 9-a de junio, mi estis jam hejme, ekde kiam komenciĝis gravaj politikaj eventoj en nia lando.

Septembro 1923...

La Naŭajunia faŝista puĉo de Aleksandăr Cankov rezultigis la gloran Septembran Ribelon, en kiu mi aktive partoprenis. Tiam mi estis antaŭgimnazia instruisto en vilaĝo Stubel. Kiam eksplodis la ribelo, mi metis min je dispono al la vilaĝa revolucia komitato. La 23-an de septembro 1923 el Vraca venis en Stubel Gavril Genov kune kun la vracano Krăstju Kotov. En Vraca estis fiasko. Marŝante tujnokte, ili estis tre lacaj. Per kabrioletoj mi veturigis ilin al Ferdinand. Tie mi estiĝis rotestro de 120 revoluciuloj — preskaŭ nearmitaj. Mi devis konduki ilin en vilaĝon Glavaci

por helpi al Vraca. Post dutaga restado en la arbaro de Mătnica la komunikado kun Vraca nerealiĝis. . . Venis la fiasko de la Septembra Ribelo.

Mi estis arestita kaj transdonita al la sang- avida, kun malbona famo kapitano Ĥarlakov en urbo Ferdinand, kiu senhezite kondamnis min je morto. Dank' al mia ruzo kaj oportuna por la momento sagaco, mi ne estis mortpafita, sed eĉ nun mia nomo figuras forstrekita en la listo de la viktimoj dum tiu tempo, zorge gardata en la Muzeo de Revolucia Movado en Sofio.

Ekde tiam mi estas vracano kaj sub la protekto de la tiama ministro Cvjatko Boboŝevski, komencis mian normalan Esperanto-aktivadon. Guste la unuan de januaro 1924 mi fondis mian E-societon „Sukceso“ kaj la unuan kurson de Esperanto, en kiu enskribiĝis pli ol 150 gekursanoj, precipe progresemaj gejunuloj, por kiuj la Internacia Lingvo fariĝis laŭleĝa ŝirmilo, malantaŭ kiu oni povis kunveni kaj politike vivi.

Multajn ruzojn kaj trompojn mi devis uzi en la dorna kaj zigzaga vojo de la societo, kiu kreskis, maturiĝis kaj ebligis la okazigon en Vraca de la 15-a Nacia Esperanto-kongreso en 1928, kiu devis lukti kaj venki la multajn faŝistajn tendencojn dum tiuj jaroj.

Mi jam estis egalrajta kaj aktiva membro de BEA, respektata vracano civitano, kun granda Esperanta kaj vivpraktiko, konstanta UEA-delegito, kelkara ĉefdelegito por Bulgario kaj senlaca propagandisto kaj kursgvidanto de Esperanto en Vraca kaj aliaj urboj.

Mia unua filino — Esperantina — denaska esperantistino, jam kiel infano fariĝis modelo de la naciaj E-kongresoj per siaj vervaj recitaĵoj kaj salutparoloj en Esperanto. Mi regule vizitadis ĉiujn landajn kongresojn, multajn el kiuj mi prezidis. Mi havis la ŝancon viziti ankaŭ kelkajn el la Universalaj kongresoj en Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kie mi kon-

taktis kun elstaraj alilandaj geesperantistoj, multaj el kiuj ne plu vivas. Ĉu oni povas forgesi la nomojn de Hans Jakob, Ernst Dresen, Eroŝenko, Albert Einstein, la fratinoj Drezen, Teo Jung, Edmond Privat kaj aro da aliaj plej ordinaraj, sed honestaj kaj fidelaj adeptoj de la lingvo?

En Bulgario mi kontaktis kaj laboris kun plejado da meritaj gekamaradoj kiel ADA, Agro, kolonelo Silvestriev, Lidia Ŝiŝmanova, Dimităr Zlatarski, Panajot Kolev, d-ro Zahari Zahariev kaj multaj aliaj apostoloj de Esperanto, kiuj lasis fajran spuron en la historio de la enlanda kaj alilanda E-movado.

Amason da leteroj kaj diversaj memoraĵoj ornamas mian familian arkivon, kiujn mi ĵaluzas gardas kaj alte taksas kaj kiujn mi ne cedus al kiu ajn, eĉ kontraŭ ora havaĵo. Tion tamen la eksa faŝista polico tute ne konsideris kaj ĉe unu el la multaj traserĉoj en mia domo oni konfiskis parton de tiu multekosta por mi havaĵo.

Tiaj estas la skizitaj fragmentoj el mia Esperanto-vivo, kiujn mi dediĉis al la 75-jara jubileo de nia enlanda movado. Mi estas fiera, ke en la multdetala maŝino de Esperanto-movado mi estas malgranda radeto, kiu fidele kontribuis por la normala funkciado de tiu maŝino ĝis nun.

Radoslav TRICHOV

REMEMORO EL LA PASINTECO

En 1931 mi sukcese finis E-kurson en urbo Vraca, kies gvidanto estis la veterano de la E-movado en Bulgario Radoslav Triĉkov.

Mian interesigon pri Esperanto mi ŝuldas al Jordan Ljutibrodski — elstara aganto de la eksterleĝa en tiu periodo Bulgara Komunista Partio. Li ankaŭ estis esperantisto.

Nian E-kurson partoprenis laboristoj, oficistoj, metiistoj, lernantoj kaj homoj de liberaj profesioj, inter ili ankaŭ la konata bulgara poeto *; Ivan Aleksiev — Burin, tiam lernanto. Al Esperanto mi multon ŝuldas pri mia formiĝo kiel individuo. Mi regule kores-

pondis kun multaj esperantistoj el Eŭropo kaj Ameriko. Kun mia ĉefa amiko Vilhelmo Hajduĉek el Moravska Ostrava mi korespondis ĝis la Interkonsento en Munkeno — 1938, kaj poste mi ne plu ricevis novaĵojn pri li. Mi estus ĝoja, se mi povus ekscii ion pri li kaj eventuale renovigi niajn iamajn kontaktojn.

Mi invitas la partoprenintojn en la E-kurso en 1931 en Vraca anonci sin al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“. Mi volus organizi renkontigon de ĉiuj kursanoj de la E-veterano Radoslav Triĉkov.

Isak AVRAMOV

(1848 — 1876)



Grafikaĵo de Hristo Hristov

Hristo Botev estas inter la maloftaj historiaj personecoj, kies pensoj, parolo kaj faroj plej plene respegulis ilian epokon, edukis ne unu generacion, estigante por ili morala kriterio. Botev estas en la sango de ĉiu bulgaro, en lia nacia konscio. Botev ne havas agon, ĉar la problemoj de li starigitaj vivas ankaŭ hodiaŭ. Li neniam transformigis nek transformigos en historion.

Botev vivis kun la progresemaĵoj de sia epoko. La plej grava problemoj, emociiganta la grandan revoluciulon, estis la problemoj pri la liberigo de la bulgara popolo. „Ni bezonas, — li skribis — revolucion popolan, senprokristan; revolucion, kiu purigos la Balkanan Duoninsulon ne nur de la turkoj, konsiderantaj nin kiel brutojn, sed ankaŭ de ĉio alia, kio povus malutili niajn strebojn al plena kaj absoluta homa libero“.

Botev estis unu el la plej grandaj publicistoj de sia tempo. Gravan lokon en lia belarta-publicista heredaĵo okupas liaj felietonoj. Bonega publicisto kaj felietonisto, li tamen vivis en la konscio de la popolamasoj precipe kiel poeto.

La poezio de Botev estas nacia, originala, kaj samtempe ĝi estas internacia, tuthomara poezio. Ĝi egale apartenas al la bulgara kaj al la monda literaturo. Kiel Petöfi kaj Mickiewicz, Botev konigis al la homaro la tragikan sorton de sia malgranda popolo, prikantis lian heroaĵon kaj spiritforton; same kiel ili, li kunfandis poezion kaj vivon, transforminte ilin en legendon per sia heroa morto...

MIA PREGO

Hristo BOTEV

Ho, vi, dio, justa dio!
Ne vi en la firmamento,
sed vi, kiu estas, dio,
en la koro kaj prudento. . .

Ne al kiu riverencas
pastroj kaj monaĥoj niaj,
per kandeloj rekompencas
ortodoksaj brutoj fiaj;

ne vi, kiu la geulojn
estas el argil' farinta
kaj la homon en la mondo
lasis sklavo kompatinda;

ne vi, kiu sur la tero
oleumis reĝojn, papojn
kaj forlasis en mizero
la malriĉajn miajn fratojn;

ne vi, kiu igas sklavon
sole preĝi kaj toleri
kaj lin nutras ĝis la tombo
per himeroj kaj esperoj;

ne vi, dio de l'adultaj,
de l' tiranaj fiaj klikoj,
ne idolo de la stultaj,
de la homaj malamikoj!

Sed vi, dio de l'prudento,
defendanto de l' parioj,
kies feston en konsento
baldaŭ festos la nacioj!

Vi al ĉiu do inspiu
por liber' vivantan amon,
por ke luktu ĉiu viro
kontraŭ la popoltiranoj.

Plifortigu mian brakon,
por ke dum ribel' de l' sklavo
en la vicoj de l' atako
ankaŭ min la morto trafu!

Malvarmiĝi vi ne lasu
koron en fremdlanda loko,
kiel en dezert' ne pasu
senresone mia voko! . . .

El la bulgara tradukis: M. LJUBIN

(1863—1897)



Aleko Konstantinov estas unu el la klasikuloj de la bulgara literaturo. Li naskiĝis la unuan de januaro 1863 en urbo Sviŝtov, en la familio de progresema kaj klera komercisto. Fininte la gimnasion en urbo Gabrovo, en 1878 li forveturis al Rusio, kie lernis en la gimnazio en urbo Nikolaev, kaj en 1885 finis siajn studojn de juro en Odeso.

En 1885 A. Konstantinov revenis Bulgariion, kredante ke en la lando ĵus ricevinta ŝtatan kaj politikan sendependecon, estos realigitaj la altaj idealoj de la batalantoj por nacia libero, ke oni jam konstruas novan demokratian Bulgariion. Sed por la demokratoj en Bulgario — publicistoj, literaturistoj ktp, komenciĝis periodo de seniluziigoj: „Ni plantis rozojn, sed elkreskis dornoj“ — skribis la bulgara prozisto Miĥalaki Georgiev.

Aleko Konstantinov estis pasia naturamanto kaj turisto. Respondante al la demando de amika enketo — „Kiu estas via preferataodoro?“ — li skribis: „Laodoro de vaporŝipoj kaj fervojoj“. La veturado trans la oceano al la Tutmonda Ekspozicio en Ĉikago donis al la verkisto materialon por la vojaĝskizoj „Al Ĉikago kaj returne“ (1893), en kiuj li malkovras la socian malegalecon en Usono.

Plej grandan literaturan sukceson al la verkisto alportis la ciklo de satiraj rakontoj „Baj Ganju“, eldonitaj en aparta libro en 1895. La

nomo de Baj Ganju — entreprenema spekulanto kaj politikemulo, estiĝis sinonimo de la malklereco kaj senbrida aroganteo de la ĵus formiĝanta bulgara burĝaro.

La politikajn morojn de sia tempo Aleko Konstantinov prezentas ankaŭ en siaj felietonoj, kiuj estas kruela akuzo kontraŭ la „herooj“ de la epoko — entreprenistoj, terposedantoj, komercistoj, bankieroj.

La reakciularo pardonis al Aleko Konstantinov nek liajn felietonojn, nek lian satiran libron pri Baj Ganju. Kaj en majo 1897, apud urbo Pazarĝik, li pereis de la kuglo de pagita murdisto.

La morto de la populara verkisto provokis la indignon de la tuta progresema publiko. „Kiel viktimo de la deliktoj en nia politika vivo falis Aleko Konstantinov, tiu ĉi sama Aleko, kiu povus esti literatura fieraĵo de kiu ajn klera popolo kaj de kies talento multon atendis honesta kaj intelektula Bulgario.“ (D. Blagoev).

AL ĈIKAGO KAJ RETURNE

(Fragmento)

Broadway Central Hotel havas okcent ĉambrojn. Niaj ĉambroj estis en la kvina etaĝo. Post unu horo, jam tute pretaj, ni malsupreniĝis en la duan etaĝon, kie estis la restoracio. Ĉirkaŭ ni tagmanĝis cent da homoj, sed dio mia, kiaj homoj! Neniaj interparoloj! Tomba silento! Provu kompreni tiujn ĉi usonanojn! Mi ne scias, kian impreson ili ekhavis pri ni, sed en la fino de la tagmanĝo ni ĉiuj venis al la konkludo, ke certe en neniu parto de la terglobo ekzistas pli sengustaj manĝaĵoj ol la anglaj, transplantitaj ankaŭ en Usonon. Dum la tagmanĝo ni ne rimarkis iun el la gastoj trinki vinon aŭ bieron — antaŭ ĉiu estis nur glaso da glacie malvarma akvo. Tial ankaŭ ni subiĝis al la loka kutimo — ni manĝis sangantan sensalan viandon en blanka saŭco kaj surverŝis ĝin per malbongusta glacia akvo. Oni alportis la kafon — per si mem la kafo estis bona, altkvalita, sed same difektita de la kuirmaniero. Ni ĉirkaŭrigardis por vidi ĉu iu fumas. Neniu fumis! Se iu provus, la tuta salono rigardus al li kiel al ege needukita homo, kaj se en la salono estus damoj, okazus grandega skandalo! Sed tiuj ĉi samaj bonedukitaj usonanoj, severe observantaj la etiketon, opinias ke eĉ se en iu salono estas tricent

damoj, estas tute nature resti nur en veŝto, meti la kruojn sur alian seĝon aŭ eĉ sur la tablon, kaj en tiu pentrinda pozo legi gazetojn. Ni prenis niajn ĉapelojn kaj forlasis la restoracion.

Kaj jen ni estas sur Broadway. Tio ĉi estas la plej larĝa, plej longa kaj, escepte de ĝia preterborda parto, la plej homoplana strato, kiu tranĉas Novjorkon preskaŭ laŭ ĝia tuta longo.

La plej bela strato, kiun mi vidis en Eŭropo, sendube estas Ringstrasse en Vieno. Sed mi devas konfesi, ke la Novjorka Broadway faris al mi multe pli fortan impreson. Ringstrasse estas eleganta marmora belulino. Broadway estas ĉarma, vestita en ĉiuj koloroj de la ĉielarko dancanta baletistino. Broadway malproksimiĝas al la horizonto, mallarĝiĝas, paliĝas kaj malaperas direkte al la oceano. Kun nenio estas komparebla la mirinda, kvazaŭ tremetanta bunteco de tiu ĉi strato. . .

Sed sufiĉe pri Broadway. Mi deflankiĝis — ja, kiel la leganto memoras, ni estis direktiĝintaj por trinki bieron. Nia ĉiĉerono kondukis nin al sufiĉe pura kaj vasta trinkejo. La tabloj estis neokupitaj, sed ĉe la bufedo estis konstanta movado; oni venis, mendis bieron aŭ viskion, trinkis ĝin, pagis kaj silente retiriĝis. Dank' al dio, ke tiu ĉi trinkejo ne estis pure usona, alie ni ne havus la plezuron sidiĝi ĉirkaŭ la tablo kaj, dolĉe interparolante, trinki po kelkaj glasoj da biero, sed, simile al tiuj ĉi mutaj, malvarmaj vizitantoj — kvazaŭ ne vivantaj homoj, sed homsimilaj maŝinoj, devus starigi ĉe la bufedo, kiel tion faras ĉe ni nur veraj drinkemuloj, kaj silente malpleniĝi la glasojn. Feliĉe, la mastro de tiu ĉi trinkejo estis germano, kiu ĉiam ankoraŭ ne entute amerikaniĝis. Ni rimarkis, ke diversaj personoj venas, trinkas kaj foriras, sed unu homo konstante staris ĉe la bufedo, trinkis kaj donis orelon al nia interparolo. Jen al li proksimiĝis iu junulino. Li murmuris al ŝi ion angle kaj aldonis en serba lingvo: „Foriru vi, pro dio!“ Li intence diris tiujn ĉi vortojn kaj ni tuj reagis:

— Ĉu vi estas serbo? — demandis lin la doktoro.

— Jes, mi estas serbo, kaj vi? — interesiĝis li, treege ĝoja.

— Ni estas bulgaroj!

— Tute egale ĉu serboj, ĉu bulgaroj — ni estas fratoj-slavo!

Ne atendante inviton, nia nova konato — Nedelkoviĉ, sidiĝis ĉe nia tablo. La trinkej-mastro — grandstatura, bela, tre bonanima, konstante ridetanta bavaro, kaj lia edzino — korpulenta blankhaŭta saksino, al kiuj tedis la fera malvarmo de la usonanoj, entuziasmiĝis pro la sentimentaleco de la treege kontenta baj Nedelkoviĉ kaj, elpetinte permeson, ankaŭ sidiĝis ĉe nia tablo, kiun la afabla dommas-trino superŝutis per plej diversaj lunĉaĵoj.

Kiel Nedelkoviĉ, tiel ankaŭ la bavaro estiĝis usonaj civitanoj. Ili deŝiriĝis de la patrolanda tero kaj nun sincere kaj fiere ili sin nomas usonanoj. Ili regule legas gazetojn kaj estas ĉiam bone informitaj pri la usonaj aferoj, ne forgesante ankaŭ Eŭropon. Mi konvinkiĝis, ke baj Nedelkoviĉ scias, kio okazas eĉ en nia de dio mem forgesita mondparto. . . Mi komencis esprimi mian admiron pri la usonaj libero kaj egalrajteco, pri ilia ŝtata arango — pri ĉio ĉi, kio impresis min ĉe la legado de libroj pri Usono; sed baj Nedelkoviĉ surverŝis min per malvarma akvo, kiam li mem komencis rakonti al mi, ke „tie ĉi estas tia granda korupto, kia estas nenie aliloke; ĉe vi, en Eŭropo, homoj estas imperiestroj, kaj tie ĉi la oro estas imperiestro: kiu havas plej multe da oro, tiu estas plej forta. La mono estas reĝino, kiel oni diras ĉe ni.“ Tio estas la plej ofta temo por la usonanoj — kiel en interparoloj, tiel same en la gazetaro. „Terura korupto“ — ripetis baj Nedelkoviĉ, montrante al ni la vundojn, kiujn kaŭzis la monavido al la socia organismo de Usono.

Li rakontis al ni pri la korupto de la administracio, pri la grandegaj fraŭdoj en la entrepreno kaj en la publika konstruado. „Per oro oni povus aĉeti eĉ la prezidanton mem“. Dum tiu ĉi konversacio, kiu konfuzis min kaj igis min enpensiĝi, la doktoro rigardis min tra la okulvitro per sarkasma mefistofela rideto, kvazaŭ dezirante diri al mi: „Nu, ĉu vi aŭdis? Ĉu vi konvinkiĝis, ke ankaŭ en Usono estas la sama afero?“. . . Sed la fakto „ke ankaŭ en Usono estas la samo“ tute ne varmiĝis mian koron.

ALEKO KONSTANTINOV

El la bulgara: L. RAEVA

Tradicia studenta festo

La 4-an — 5-an de decembro 1982 en Pleven okazis unu el la tradiciaj aranĝoj de Bulgara Esperanto-Junularo — Nacia Studenta Renkontiĝo. Ĉi-foje la partoprenintoj havis la plezuron ĉeesti junularan balon. Ĝin partoprenis ĉ.80 gestudentoj kaj gejunuloj el Blagoevgrad, Velingrad, Loveĉ, Pleven, Stara Zagora, Sofio kaj Ŝumen.

De la oka vespere ĝis la unua horo post noktomezo ni dancis, amuziĝis kaj festis. Okazis du konkursoj: pri dancado kaj pri plej bela kostumo. La unuan premion gajnis du personoj el la sofia grupo, kiuj prezentis „knabinecon kun sia kateto“.

Bone prezentis sin la Grupo por Politikaj Kantoj „Gervena Oktava“ (Ruĝa Oktavo) el Blagoevgrad. Gi plenumis kelkajn kantojn — esperante kaj bulgare. . .

Estis agrable kaj ĝoje!

Kalinka VASILEVA

LA BULGARAJ PROPRAJ NOMOJ EN ESPERANTO

Komencante lerni Eperanton aŭ alian fremdan lingvon, la bulgaroj miras, ke oni skribas la proprajn nomojn laŭ la ortografioj de la koncernaj diversaj lingvoj. Poste ili komprenas, ke en la okazo oni preferas la malpli grandan malbonon. La pli granda malbono estus, se oni skribus ekzemple la nomon de la senmorta germana poeto Goethe laŭ la ortografioj de la diversaj naciaj lingvoj, ĉe kio, Goethe, se li estus vivanta, mem ne povus rekonigi sian nomon.

La bulgarajn proprajn nomojn oni skribadis (kaj ankaŭ nun skribas) laŭ la ortografioj de franca, angla, germana, itala kaj aliaj lingvoj. Estigis granda diverseco, ekz. kiam oni devas prezenti en diversaj lingvoj la konsonantojn ĝ, ĵ, ŝ kaj aliajn. Nur c (certa, citrono) estas prononcata en diversaj lingvoj kiel c, k, ĉ, ŝ, eĉ en unu kaj sama lingvo — diversmaniere. Ekzemple: la germanoj skribas Karl Marx, sed Carl Zeiss.

Jam ĉe sia ekesto la slava alfabeto havis specialajn literojn por ĉ, ĵ, ŝ, ĉ, ж, ш. Kaj kiel oni skribas ĉ, ĵ, ŝ en la supraj lingvoj? Terura diverseco, eĉ ĥaoso, en kiu oni ne povas orientiĝi!

En 1956 en Bulgario oni akceptis oficiale unuecan sistemon por transliterado de la bulgaraj propraj nomoj per latina alfabeto, uzante antaŭ ĉio la simplecon kaj la klarecon de la ĉeĥa kaj la kroata alfabeto. Kompreneble, la bulgaroj ne volas altrudi tiun ĉi transliteradon al aliaj nacioj.

Tiun ĉi transliteradon la bulgaraj lingvistoj publikigas en la ortografiaj vortaroj jam de 1954. Ĝi aperis ankaŭ en la plej aŭtoritata gramatiko de la nuntempa bulgara literatura lingvo — Fonetiko, I vol. (Bulgara Akademio de Sciencoj. Sofio, 1982, paĝoj 282—283).

Facila kaj simpla estas la skribado de la bulgaraj propraj nomoj en Esperanto. Sed en bulgara lingvo ekzistas specifa vokalo, por kiu la latina alfabeto ne havas literon. Eĉ la ceteraj slavaj lingvoj ne havas tiun ĉi vokalon. Por la celo oni akceptis literon *â* el la rumana alfabeto. En la kongresa libro (Varna, 1978), paĝo 18 figuras *â* kontraŭ la bulgara litero *r* kun klarigo, ke ĝi sonas kiel *o* kaj *u* en la anglaj vortoj *London, sun*. Ne parolante pri plena identeco, por komparo ni donos ekzemplojn de proksimaj sonoj en iuj lingvoj.

En angla proksiman vokalon oni havas en

la vortoj *her, earth, girl, fur*. Por la bulgaroj simile (proksime) sonas la substrekitaj literoj en la anglaj propraj nomoj: *Boston, Bristol, Churchill, Liverpool, London, Manchester, Washington* (laŭ la kvinvoluma Mallonga Bulgara Enciklopedio. Sofio, 1963—1969).

Proksima vokalo estas la neakcentita germana *e* en la vortoj: *haben, sprechen, meine Mutter*.

En bulgara, en rumana kaj en turka la pritraktata vokalo povas esti akcentita kaj tial la rumana kaj la turka lingvoj estas pli proksimaj al la bulgara lingvo.

La rumana lingvo havas tri proksimajn vokalojn: *â, ă, î*. Por nia celo ne estas gravaj la subtilaj diferencoj inter ili. Rumanaj propraj nomoj (geografiaj) kun tiuj ĉi vokaloj: *Bîrlad, Brâila, Călarăși, Tîrgoviște, Turnu Măgurele, Tirnăveni, România, limba rumina* (rumana lingvo).

En la turka por tiu ĉi vokalo oni uzas *i* sen punkto: *adapazarı, ayvalık, balıkesir, bandırma, kırıkale, Kırklareli* (bulgare Lozengrad) *Kızılirmak, Nazım Hikmet* (poeto).

En bulgara, en rumana kaj en turka oni povas skribi tiujn ĉi nomojn ĝuste kaj konsekvence. Ĉe la prononcado povas ekzisti iuj subtilaj diferencoj.

La rusoj skribas la pritraktatajn bulgarajn proprajn nomojn ĉiam kaj konsekvence per *ы*: ekzemploj en bulgara, en Esperanto kaj en rusa: *Търговище — Târgoviște — Тырговиште, Казанлък — Kazanlâk — Казанлык, Кърджали — Kârgali — Кырджали, риверо Искър — Iskâr — Искыр*.

La koncernajn turkajn nomojn la rusoj skribas same: *Кыркларели, Бандырма, Адапазари, Назым Хикмет*. La rumanaĵoj la rusoj skribas dumaniere, kio venigas al penso, ke ekzistas diferenco inter la du vokaloj: *Румыния, Кэлэраш, Фэгэраш, Врэила, Дымбовица, Хыршова*.

Por prezenti skribe la preparolatan bulgaran vokalon, la anglaj uzas kiel specialan literon la esperantan *û*. Almenaŭ ni vidas tion en la angla originalo de la libro „Apostolo de libereco“ (the Apostle of freedom) de Mercia Macdermott. Bulgare Петър, Димитър, en Esperanto *Petâr, Dimitâr*; angle *Petûr, Dimitûr*.

La poloj ankaŭ alprenis tiun ĉi skribadon de bulgaraj propraj nomoj. Almenaŭ en pola aŭtomobila mapo de Eŭropo (1972) ni trovas: *Kazanlâk, Veliko Târnovo, riveroj Iskâr, Osâm*.

Nun la bulgaroj estas registrataj en diversaj dokumentoj per tri nomoj: persona, patra, familia. La patra kaj la familia havas formon de poseda adjektivo kaj estas diversaj por viroj kaj por virinoj. La virinaj havas finaĵon -a: Borovanski-Borovanska, Grigorov-Grigorova, Aleksiev-Aleksieva.

Pro la sensistema skribado de la bulgaraj propraj nomoj per latina alfabeto ĝis nun oni prezentis tiun ĉi specifan vokalon diverse: per a, i, e, u, aŭ simple forigis ĝin. Tial anstataŭ unu difinitan kaj konstantan formon, ekz. Dimitar oni skribis: Dimitar, Dimiter, Dimitro, Dimitr. La bulgaroj ne povas prononci Petr, Dimitr, teatr, metr, Aleksandr, tial ni intermetas ĉ en ĉiuj similaj okazoj.

Nun ni rajtas skribi Krâstanov anstataŭ la ĝisnunan Krestanov, kaj diferencigi Todor Kânev, la iaman tradukinton de „Esperanto en dek lecionoj“, de la nuna (sed ankaŭ malnova) esperantisto Hristo Kanev.

Konklude ni ripetas: en Bulgario oni akceptis la ĉeĥan kaj la kroatan ortografion, ĉar ili estas simplaj, sed aldonis la menciitan literon de la rumana alfabeto. Ni ankaŭ alprenas ĝin, ĉar tiel estas skribataj ĉe ni per latina alfabeto la propraj nomoj en vojmapoj, gvidlibroj de la fervojoj, planoj de urboj. Kaj tio estas la malpli granda malbono kompare kun uzado de dekoj da fremdaj ortografioj.

Simeon HESAPĈIEV

ŜI BRILOS KIEL VERDA STELO . . .

Respondo

Leteron vian, ho amiko fora,
ricevis mi kaj sentis mi la ploron
de via kor' amanta, sed ĉagrena
pro l' negra vivo peza, zorgoplena.

Malsana kuŝas nun patrino via,
ne teksas plu ŝi, kaj la sunradioj
ne tuŝas lacan korpon, kaj facila vento
ŝin ne karesas per amika sento.

Ne scias mi, ĉu povus ŝin kuraci
prizorgo via, via pen' senlaca,
kaj ĉu kunsento mia malproksima
ĝojigos ŝin trans maroj kaj landlimoj.

Sed vi, amiko, nun ne malesperu:
la lukto sankta por justec', libero,
kunigas ĉiujn nigrajn filojn flame,
ĉar ili jugon ne toleras same.

Akceptu korsalutojn, kara frato,
kaj sciu vi: en mia land' amata
egale vivas ĉiuj homoj ĝoje,
ĉar ili marŝas socialisman vojon.



Ne plu estas inter ni nia kara samideanino Sinka Filaretova, sed la morto estas senforta antaŭ la ravo de ŝiaj personeco kaj poezio.

Naskita la 30-an de decembro 1937, ŝi forpasis tro frue pro kormalsano.

Ŝi okupiĝis pri Esperanto de 1957 — gvidis multajn kursojn, estis estrarano de societo „David Sasonov“, kunlaboris al „Bulgara Esperantisto“ kaj al aliaj E-gazetoj per versaĵoj.

Energia, inspirita, modesta, ŝi eĉ momenton ne restis sen ago kaj entuziasmigis ĉiujn ĉirkaŭ si.

En ŝi estis sintezitaj la plej bonaj trajtoj de kreanto kaj sociaganto, de milda kaj abnegacia virino, edzino kaj patrino.

Por ŝi la laboro kaj la kreado estis nedivideblaj — la kreado estis ŝia persona sorto.

Sia tuta vivo, ŝiaj koro kaj animo estis plene fordonitaj al Esperanto kaj ŝi ĉiam bri-los kiel verda stelo en nia memoro.

Ni kliniĝas antaŭ ŝia hela memoro.

Lasta rendevuo

Vi silentu, mia kara!
Ne parolu, ĉar doloro
jam obsedas en amaro
kaj turmento mian koron.

Ne karesis min per varmo
la okuloj viaj helaj.
Tiam tuŝis min la svarmo
nur de rememoroj belaj.

Vi ne povas plu, amato,
estis mia suno ora,
ĉar ni estas nur konatoj,
nur konatoj foraj, foraj. . .

Nia lastrenkonto estis
sen karesa vort' kun larmoj.
Amo mia! Ĉu restis?
Nur la rememoroj ĉarmaj!

La fidela, granda amo
ĉiam estas fajr' brulanta —
kun eterna arda flamo,
kiel festo, kiel kanto.

Sinka FILARETOVA

Internaciaj, naciaj kaj regionaj arangoj dum 1983 en Bulgario

I. Internaciaj kaj naciaj E-arangoj

N-ro	Dato	Loko	Arango	Adreso
1.	Vintra lernanta feriado	Vraca	Vintraj Feriaj E-Kursoj	3000 Vraca, p. k. 66, Bojčo Mladenov
2.	26—27. III. 83	Sofio	Konferenco de la bulgara MEM-komitato	1303 Sofio bul. „Ĥr. Botev“ 97, MEM
3.	Printempa lernanta feriado	Vraca	Printempaj Feriaj E-Kursoj	3000 Vraca, p. k. 66 Bojčo Mladenov
4.	1—3. IV. 83	Kazanlák	XVI Nacia Revuo de la E-parolo kaj Kanto	6100 Kazanlák, „Otec Paisij“ 12, E-societo „Roza Valo“
5.	8. V. 83	Ruse	III Renkontiĝo de la esperantistoj-kooperativanoj	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Kooperativa sekcio de BEA
6.	28—29. V. 83	Vraca	III Internacia Esperanta Recitalo-Kenkurso de Botev kaj Bulgara Revolucia Poezio	3000 Vraca, p. k. 66, Bojčo Mladenov
7.	27. V.—4. VI. 83	Gabrovo	Nacia E-Renkontiĝo „Humuro kaj satiro—83“	5300 Gabrovo, „Opálčenska“ 28, DE de BEA
8.	28—29. V. 83	St. Zagora	Konferenco de la agriarspecialistoj-esperantistoj	4550 Peŝtera, „Oboriŝte“ 15, Sterju Kukuŝev
9.	3—5. VI. 83	Karlovo	Konferenco de la ekoloĝoj-esperantistoj	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, CE de BES
10.	11 —12. VI. 83	St. Zagora	Scienc-praktika konferenco „60 jarojn Septembra Ribelo — 1923“	1303 Sofio bul. „Ĥr. Botev“ 97, CE de BEA
11.	1—10. VII. 83	Vidin—Ruse	Remboata Navigado laŭ Danubo	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, CE de BEA
12.	20—28. VII. 83	V. Tárnovó —Sviŝtov	Internacia E-Universitato	5000 V. Tárnovó, p. k. 266, DE de BEA
13.	20—30 VII. 83	Tárgoviŝte	Internacia Festivalo de la esperantistoj-ŝakistoj „Tárgoviŝte—83“	7700 Targoviŝte, p. k. 174, DE de BEA
14.	23—24. VII. 83.	v. Pisanica	Antaŭkongresa renkontiĝo de la virinoj-esperantistinoj	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Virina Komisiono de BEA
15.	11—30. VIII. 83	v. Pisanica	Internaciaj E-Kursoj	1000 Sofio, p. k. 791, IEK
16.	9—23. VIII. 83	Varna	Internaciaj Kursoj por E-Kadroj	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, CE de BEA
17.	3—4. IX. 83	Sofio	Nacia Konferenco pri Fakultativa E-Instruado	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Instruista Sekcio de BEA
18.	1—2. X. 83	Suna Bordo	III Nacia Konferenco de la fervojistoj-esperantistoj	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Fervojista Sekcio de BEA
19.	8—9. X. 83	Bankja	Balkanlanda E-Renkontiĝo: „Komenco kaj evoluo de E-movado en la balkanaj landoj“	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, CE de BEA
20.	13—16. X. 83	v. Pisanica	Konferenco de junaj E-beletristoj kaj poetoj	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, CE de BEA
21.	26—27. XI. 83	Loveč	Nacia Renkontiĝo de Medicinistoj-Esperantistoj	5500 Loveč Psiĥobolnica, Tjuran Omer
22.	3—4. XII. 83	v. Pisanica	Nacia Seminario por Junaj E-aktivuloj kaj Studenta E-Renkontiĝo	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, BEJ

II. Regionaj E-arangoj

1.	Vintra lernanta feriado	v. Pisanica	Infana E-Feriano kun E-Kurso	1000 Sofio, p. k. 791, IEK
2.	9. IV. 83	Bankja	Printempa E-Festo	1720 Bankja „Al. Stambolijŝki“ 7, E-societo „Solidareco“
3.	16—17. IV. 83	Gálábovo	Printempa E-Balo	6285 Gálábovo, „St. planina“ 12, E-societo „Kolombo de la paco“
4.	22—23. IV. 83	Loveč	„Siringa Vesperto“ — Konkurso de Originala E-Poezio	5500 Loveč p. k. 29, DE de BEA
5.	7. V. 83	Ruse	Junulara E-Renkontiĝo	7000 Ruse, p. k. 425, DF de BEA
6.	7—8. V. 83	Ruse	Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE)	La ĉi-supra adreso
7.	14—15. V. 83	Trojan	Spertintersaĝo inter E-Societoj	5500 Loveč p. k. 25, DE de BEA
8.	14—15. V. 83	Pazarĝik	Regiona Pedagogia E-Konferenco	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Instruista sekcio de BEA

9.	15—25. V. 83	Velingrad	„Tra kampoj kaj arbaroj“ —Internacia Seminario-Feriado	4600 Velingrad, p. k. 7, E-societo „St. Kalpazanov“
10.	21 —22. V. 83	Sliven	Regiona Pedagogia E-Konferenco	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Instruista sekcio de BEA
11.	4—6. VI. 83	Karlovo	Festo de la Rozo	4300 Karlovo, p. k. 44, E-societo „V. Levski“
12.	4—10. VI. 83	Karlovo	Internacia E-Feriado „Karlovo—83“	La ĉi-supra adreso
13.	14. VI. 83	Bankja	Festo de la Mineralakvo	1720 Bankja, „Stamboljiski“ 7, E-societo „Solidareco“
14.	17—20. VI. 83	Sofio	Tagoj de la E-Kulturo „Sofio—83“	1202 Sofio, „Makariopolski“ 4, UE de BEA
15.	18—19. VI. 83	Varna	Mara Amika Renkontigo Esperantista (MARE)	9000 Varna, p. k. 298, DE de BEA
16.	25 —26. VI. 83	Vraca	Regiona Pedagogia E-Konferenco	3000 Vraca, p. k. 66, Bojĉo Mladenov
17.	25—26. VI. 83	Ruse	Regiona Pedagogia E-Konferenco	1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Instruista sekcio de BEA
18.	2—3. VII. 82	Samokov	Renkontigo de Esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario	2000 Samokov „Ĥr. Smirnen-ski“ 26, E-societo „Rila Esperantisto“
19.	1—10. VII. 83	v. Borima	Seminario — Somera Feriado	5500 Loveĉ p. k. 29, DE de BEA
20.	5—19. VII. 83	Petriĉ	Turista E-Marŝo „Pirin—83“	2850 Petriĉ, „G. Delĉev“ 8, E-societo „Esperanto triumfonta“
21.	15—17. VII. 83	Orjaĥovo	Somera E-Renkontigo sur insulo „Esperanto“	3300 Orjaĥovo, „Sofijska“ 14, Nadejda Bosaska
22.	30. VII. 83	Bankja	Festo de strato „Esperanto“	1720 Bankja „Stamboljiski“ 7, E-societo „Solidareco“
23.	1—25. VIII. 83	v. Debnevo	Internacia Arkeologia Esperantista Laborbrigado (IELBA)	5500 Loveĉ, p. k. 29, DE de BEA
24.	3—25. VIII. 83	Pleven	Internacia Esperantista Laborbrigado	5800 Pleven, „C. Cerkovski“ 14, DE de BEA
25.	6—13. VIII. 83	Pleven	Esperanta Semajno de Paco kaj Amikeco	La ĉi-supra adreso
26.	17—18. IX. 83	Drjanovo	Turista Renkontigo „Esperanto-83“	5370 Drjanovo, „12 juni“ 7, Geno Manev
27.	18—28. IX. 83	Velingrad	Internacia Esperanta Seminario-Feriado	4600 Velingrad, p. k. 7, E-societo „St. Kalpazanov“
28.	24—25. IX. 83	G. Orjaĥovica	75-jarojn E-societo „Espero“	5100 G. Orjaĥovica, p. k. 104, E-societo „Espero“
29.	30. IX.—2. X. 83	Plovdiv —Stamboljiski	Foira E-Renkontigo	4000 Plovdiv, p. k. 184, DE de BEA
30.	1—10. X. 83	v. Borima	Esperanta Seminario-Feriado „Ora Aŭtuno“	5500 Loveĉ, p. k. 29, DE de BEA
31.	1—2. X. 83	Sliven	Turista E-Renkontigo „Karandila—83“	8800 Sliven, „Dzerĵinski“ 9, Stela Nikolova
32.	15—16. X. 83	Petriĉ	Kaŝtana Vespero	2850 Petriĉ, „G. Delĉev“ 8, Kiril Ĥlebarov

LA ALIAJ PRI NI

Karaj gesamideanoj,

Delonge mi ŝatas vian landon. Antaŭ miaj okuloj nun staras kalendaro kun granda foto de via heroo G. Dimitrov. La kalendaro estis eldonita okaze de lia centjara datreveno kaj okaze de la fama Lejpciĝa proceso, kie via samlandano-heroo mirigis, entuziasmigis nin komunistojn kaj aliajn klaskonsciajn maldekstrulojn. Parkere mi scias kiamaniere li senkompatate vipis la dikulaĉon Goring kaj samtempe pledis favore por Bulgario, por komunismo! Kian senkomparan, kuraĝan ekzemplon li donis al ni! Pro tio mian tiam ĵus naskitan filon mi nomis Georges!

Dum tiu periodo mi korespondis kun alia valorega bulgaro — Trifon Hristovski. . . Ho ve, li malofte informis min pri sia malbona sano, tamen neniam li precizigis ekzakte sian teruran staton. . . Nun mi legis lian aŭtobiografian verkon „Mia vivo“. . . Kiom da suferoj kaj kuraĝo!

Ankaŭ mi legis „Sub la Jugo“ de Ivan Vazov“, „Apostolo de la Libereco“ de Mercia Macdermott, „Bulgara Prozo“, „Bopatrino“ de Georgi Karaslavov, la antologion „Septembro“ ktp. Ankoraŭfoje mi dankas Esperanton, kiu ebligis al mi koni tiajn valorajn verkojn.

Jean LEZAN,
Atur, Francio

Mi volas esprimi mian plenan kontenton pri nia restado en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisana kaj nian admiron pri tiu belega konstruaĵo en belega situo. Mi ege deziras, ke tiu mirinda laboro por Esperanto havu sian indan rekompencan per plua antaŭenpuŝo de la lingvo kaj per alfluo de vizitantoj el ĉiuj landoj, kiuj profitos de ĝi ĉu per lernado, ĉu per praktiko de Esperanto, ĉu per sia enkuraĝigo vide de tia progreso de la movado.

Adda SAKELLARPOULOU, Greklando


Mi estas abonanto de „Bulgara Esperantisto“. Kian gojon ĝi donas al mi! Ĝi montras bildon de la riĉa kultura, lingva kaj popaca agado de BEA.

Precipe interesas min la informoj pri E-instruado de infanoj. Mi mem lernas nuntempe, ĝuante la tri kurslibrojn de Violin Oljanov, kiujn sendis al mi Anton Antonov el Kubrat.

Mi vizitis Bulgarijon en 1968 kaj mi konservis bonegajn impresojn. Sajnas, ke plej fortan kreskon Esperanto havas en la socialismaj landoj. Tio estas natura kaj bona, ĉar socialismo, pacamo kaj internaciismo estas naturaj kunuloj.

Ken KEABL, Anglio

tra la **E** mondo



En UN — Novjorko: transdono de la kolektitaj fare de bulgaraj esperantistoj pli ol 103 mil subskriboj sub la Alvoko por malarmado kaj defendo de la paco de la Kvakera E-Asocio. Sur la foto (de maldekstre): la ambasadoro de Popola Respubliko Bulgario ĉe UN Krum Ĥristov (II) transdonas la kolektojn kun subskriboj al s-ro Jan Martenson (IV) — vicĝenerala sekretario de UN, en la ĉeesto de prof. Humphrey Tonkin (V), reprezentanto de UEA ĉe UN en Novjorko.

E-instruado dum ŝipekskurso

En majo mi instruis eksperimente Esperanton dum 14-taga ŝipekskurso tra la Nigra Maro. Ni vizitis la urbojn Odessa, Sevastopol, Jalta, Novorosijsk, Soĉi, Suĥumi kaj Batumi. Sur la ŝipo „Rossija“ (Rusio) kaj en ĉiuj menciitaj urboj, en kunvenoj kun lokaj esperantistoj mi prelegis pri la kara por ĉiuj popoloj de Sovetunio Georgi Dimitrov, disdonis libretojn kun lia konciza biografio kaj insignojn kun lia bildo, kiujn afable sendis al mi miaj amikoj el Bulgario.

La eksperimenta instruado de Esperanto, dediĉita al Georgi Dimitrov, estis bonrezulta. Mi pruvis, ke dum longdaŭraj ŝipekskursoj, ekzemple 14-tagaj, eblas trapasi la unuan gradon de la E-instruado.

Sergej KRAJNOV,
prezidanto de Soveta Veterana E-klubo

K-do Sergej Krajnov (la dua sidanta de maldekstre en la unua vico) kun siaj ĝekursanoj dum ŝipveturado per ŝipo „Rossija“.



La ora pordego de Kievo

Pri la Ora Pordego de Kievo — ĉefurbo de Soveta Ukrainio, mi eksciis de miaj E-amikoj, kiam ili sendis al mi bildkartojn de Kievo. Poste ili skribis al mi, ke unu el la E-kluboj en la urbo havas la saman nomon. . . Mi vizitis Kievon lige kun ĝia 1500-jariĝo. Post la kunveno en la E-klubo okaze de mia vizito, miaj amikoj montris al mi la pordegon mem — renovigitan kaj belegan malnovan fortikaĵon kun eta kapelo super la enirejo. Kun fiero ili rakontadis al mi pri ĝia historio, ne forgesante menciigi, ke tra tiu ĉi pordego neniu malamiko trairis kiel venkinto. . .


La historio de la E-klubo „Ora Pordego“ ne estas longa. Antaŭ naŭ jaroj, en la komenco de decembro 1973 okazis la unua fonda kunveno de esperantistoj el Kievo. Prezidanto estiĝis la energia Mihail Lineĉĉik, kiu ok jarojn gvidis la klubon. Ĉiujare oni organizas po du E-kursojn. Nun membroj de la klubo estas ĉirkaŭ 60 aktivaj esperantistoj, el kiuj sep estas lektoroj de Esperanto.

E-Klubo „Ora Pordego“ organizis en 1979 Tutsovetian Tendaron en la Olimpika Sporta Bazo apud Kievo, kien alvenis 325 esperantistoj el multaj respublikoj. Interesa estas la fakto, ke la nombro de la partoprenantoj koincidis tute hazarde kun la 325-jara datreveno de la reunuiĝo de Ukrainio kun Rusio.

La nuna prezidanto de „Ora Pordego“ Andreo Grafov esprimis la deziron, ke E-Klubo „Ora Pordego“ starigu kontaktojn kun iu E-societo en la malnova bulgara ĉefurbo Veliko Tŕrnovo. Interese estas, ke bazo por komunaj renkontiĝoj inter la esperantistoj el ambaŭ urboj ne mankas — promene kun miaj amikoj ĉirkaŭ la granda ponto „Poton“ sur la dekstra bordo de Dnepro, ni preterpasis belan apartan konstruaĵon — restoracio „Jantra“. La Kievaj esperantistoj atendas leterojn de siaj bulgaraj samideanoj kaj precipe de Tŕrnovanoj. La adreso de E-Klubo „Ora Pordego“ estas: ul. Turgenevskaja 27, 252058 KIEVO, Sovetunio.

Marin BĂCEV

Esperantajoj dum festo de „L'Humanite“



Nia franca amiko Gilbert Gerrier el Parizo, membro de la Internacia Komitato de MEM, organizas ĉiujare en la kadro de la Festo de gazeto „L'HUMANITE“, centra organo de la Franca Komunista Partio je la nomo de la Fédération Espérantiste du Travail (Esperantista Federacio de Laboro) standon por propagando de la Internacia Lingvo Esperanto. En la stando estas propagandataj ankaŭ „Bulgara Esperantisto“, „Scienca Mondo“, „Paco“ kaj aliaj bulgaraj E-eldonaĵoj.

La foto montras la Esperanto-standon enkadre de la Festo de „L'HUMANITE“ en 1982, kiu okazis la 13-an de junio 1982 en Le Petit Queville (apud Rouen). Sur la foto estas s-anino Antoinette Gerrier kaj s-ano Jouvair, kiu zorgas pri la stando.

Ni gratulas la imitindan iniciaton de s-ano Gerrier.
Dimităr HAGIEV

ESPERANTISTAJ CENTROJ

En sia artikolo pri la 7-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo (n-ro 1/1982 de „BE“) Nikola Iliev emfazis la gravan rolon, kiun ludas Esperanto por turismaj celoj, ĉefe: starigo de kontaktoj kun loĝantoj de la vizititaj regionoj, ricevo de senpaga loĝejo pere de „Pasporta Servo“, propagando de Esperanto por kaj pri disvastiĝo de E-turisma reto en la mondo.

Ĉi-sube ni publikigas la artikolon de nia belga korespondanto Germain PIRLOT, presita en la belga gazeto „LA DERNIERE HEURE“ de 22. 9. 1982, en kiu li daŭrigas la temon pri la Monda E-turismo sub la titolo „ESPERANTISTAJ CENTROJ“.

• • •

„... Alia ebleco por realigo de tiuj celoj estas la kreo de konstantaj esperantistaj centroj, kie oni povus havi agrablan restadon en internacia (kaj de tempo al tempo ankaŭ familia) etoso ne nur kun celo perfektigi la lingvoscion, sed ankaŭ por pliriĉigi siajn kontaktojn, trovi novajn amikojn. La adektoj de Esperanto el okcidentaj landoj certe konas du

nomojn de similaj E-centroj: GRESILLON (Grezijon) en Francio kaj la CHAUX-DE-FONDS (la So-d-fon) en Svislando.

GRESILLON estis kreita kaj funkcias ekde 1952 dank' al la iniciato kaj la sindonemo de geedzoj Micard, samkiel al la malavareco de dekoj da esperantistoj. Tiu Franca Kultura E-Centro estas en la pitoreska kastelo Grésillon, proksime al Baugé en la regiono Maine-et-Loire. Ĝi troviĝas en la centro de bieno el 17 ha kun malgranda lago kaj modesta naĝbaseno. En la kastelo povas loĝi naŭdek personoj kaj en la parko oni povas starigi tendojn laŭnecese. La unuaj jaroj estis periodo de sindona kaj vigla laboro de pioniroj, kies restaĵoj estis dediĉitaj al rekonstruado de la kastelo kaj plibonigo de la vivkondiĉoj.

La plejparto el la aranĝoj estas okazigataj dum ferioj, sed la periodo de Pasko estas rezervita por internaciarenkontiĝo de infanoj, kiuj venas por praktiki la lingvon, ripozi kaj amuziĝi. Diversaj periodoj dum la somero estas dediĉitaj al kunvenoj kaj al trigrdaj E-kursoj

por plenaĝuloj laŭ la rekta metodo, pro la partopreno de diverslingvaj grupoj. La programo inkluzivas multajn aliajn aranĝojn: kulturajn, manlaborajn (bindado, korboplektado, fotografado kaj rivelado de foto-platoj, k. a.), turismajn (esploro de la regiono), ktp.

LA CHAX-DE-FONDS estis kreita en 1976. Tiu E-centro, portanta la nomon de Edmond Privat, troviĝas en la svisa kantono Neuchâtel, estas bonege aranĝita por akcepti tutjare esperantistojn el ĉiuj partoj de Svislando kaj el eksterlando, enloĝigi grupojn por organizado de kongresoj, renkontiĝoj kaj kursoj, inter ili tiuj de „L'Ecole supérieure internationale de vacances“ (Supera Internacia Lernejo por Feriado — E. S. I. V.). La fondaĵo pri la mastrumado de sep komunumaj konstruaĵoj, tri el kiuj jam estas aĉetitaj kaj tute renovigitaj, disponigas ilin al esperantistoj kaj adeptoj de Esperanto — pli kaj pli multnombraj — feriadaj kaj ĝui enhavoriĉan instru-kaj amuzprogramon.

Antaŭ nelonge ni estis agrable surprizitaj per la inaŭguro kaj ekfunkcio de nova im-

pona internacia Esperanto-centro en vilaĝo Pisanica — Bulgario, en la pitoreska regiono de Rodopi-montaro. La Internacia Esperanto-Kursejo estas tute moderna 6-etaĝa komforta hotelo kun 210 litoj, kiu estas malfermita tutjare kaj proponas al la interesigantoj ĉiujn favorajn kondiĉojn por lernado de la Internacia Lingvo Esperanto kaj por agrabla restado kaj praktikado de la lingvo. La kursejo posedas specialan lingvan aŭdlaboratorion kun plej moderna aparataro. Laŭ la programo, dum kvar horoj matene (en kvargradaj kursoj) oni instruas Esperanton kaj la posttagmezoj estas dediĉitaj al interesaj ekskursoj en la regiono. Por 1983 oni antaŭvidas ege riĉan programon de kulturaj, sciencaj, lingvaj kaj amuzaj aranĝoj, kio esperigas nin pri sukcesa estoneco de tiu nova kaj multpromesanta fajrujo de Esperanto.

Aliaj pli modestaj ripozlokoj estas disponigitaj al niaj gesamideanoj: EBELTOFT en Danlando kaj GANDIA en Hispanio.

Evidente la nombro de esperantistaj oazoj pligrandiĝas kaj tio ja estas pruvo pri la vivo de Esperanto.

Germain PIRLOT

Repliko

K. E. Ciolkovskij kaj planlingvoj

Artikolo de Vasil Borovanski pri la kosmosciencisto K. E. Ciolkovskij aperis en **Bulgara Esperantisto** (1981, n-ro 4, p. 3—4), kaj franca traduko estis publikigita en **Le Travailleur Espérantiste** (1981, n-ro 64, p. 3—4). Ĉar en tiu ĉi versio ripetigas misinformoj, troviĝantaj en la originala Esperanta teksto, estas nepre necese ĝustigi ilin, antaŭ ol ili estos disvastigitaj plu per aliaj tradukoj. Temas pri la planlingva interesiĝo de Ciolkovskij.

Li ja ellaboris sistemon de internacia skribo en 1927 en verko titolita **Tuthomara aboco — ortografio kaj lingvo**, sed tiu projekto kaj lia provo modifi la skribmaŝinon ambaŭ fiaskis kaj estis forgesitaj de Ciolkovskij mem. Estas do eraro diri, ke en la menciita broŝuro Ciolkovskij „proponis kosman planlingvon „AO...““. Ŝajnas, ke Ciolkovskij verkis alian libreton, kiu aperis en la sama jaro, 1927, kun la titolo „**AO, la artefarita lingvo**“, sed eĉ se li estis la aŭtoro, oni ne povas tiri la konkludon, ke li estis ankaŭ la kreinto de AO.

Fakte, estas bone dokumentite, ke la aŭtoro de AO estis V. L. Gordin, kiu uzis la pseŭdonimon Beobi. La unua publikigaĵo, **AO — rusa vortaro de la homaron inventanto**, aperis en Moskvo en 1920. AO estis ciferlingvo, kiu estis reviziita de Gordin/Beobi en 1924, kiam li publikigis „**Gramatiko de la logika lingvo AO**“. Jam en 1915 Ciolkovskij komencis okupiĝi pri la problemoj de la tiel nomata kosma

lingvo por povi komunikiĝi kun vivantaj estuloj sur aliaj planedoj. Li celis uzi simplajn aritmetikajn operaciojn, supozante, ke eksterteranoj certe havas scion pri la matematiko.

La esperantistan agadon de K. E. Ciolkovskij oni povas nur magre dokumenti. Se li skribis al Popov, ke Esperanto estas „la plej bona el ĉiuj planlingvoj“, tio ne signifas, ke li farigis „ĝia arda adepto“. La membrokarto de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU), kiun Ciolkovskij sendis al Popov kune kun letero, estis same datita 4. 11. 1934. Ĉar la karto restis kun Popov, estas supozeble, ke Ciolkovskij nur aliĝis al SEU, sed neniam estis oficiale registrita kiel ano.

Ciolkovskij skribis al Popov ankaŭ jene: „Siatempe min tre interesis Esperanto kaj mi eĉ havis leteron de Doktoro Zamenhof“. Li povis informiĝi pri SEU nur post 1921, kiam tiu organizaĵo estis fondita, kaj li povis ricevi leteron de Zamenhof nur antaŭ 1917, kiam la aŭtoro de Esperanto mortis. Kiam, do, estis tiu „siatempe“ menciita en la letero de 1934? Ĉu Ciolkovskij eble interesiĝis pri Esperanto dum la fruaj jaroj de ĝia ekzisto, kiam ankaŭ li estis pli juna? Li estis nur du jarojn pli aĝa ol Zamenhof. Pri kio temas la letero, kiun Zamenhof skribis al Ciolkovskij? Ĉu ĝi estis en la rusa lingvo aŭ en Esperanto? Ciolkovskij ankoraŭ havis ĝin en 1934. Kie ĝi estas nun?

Bernard GOLDEN



El nia leterkesto

Omage al la 60-jara jubileo de Sovet-Unio

La 17-an de novembro 1982 la Sofia Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“ kaj la Domo de Soveta Scienco kaj Kulturo en Sofio okazigis en la malgranda salono de la Domo solenan kunvenon lige kun la 60-a jubileo de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj. Ĉeestis multaj sofiaj esperantistoj kaj ankaŭ gastoj-neesperantistoj.

Post unuminuta silento, per kio la ĉeestantoj honoris la memoron de la forpasinta sovetaj ŝtata kaj partia gvidanto Leonid Iljiĉ Breĵnev, Margarita Nikolajevna Repetjuk, reprezentanto de la Domo de Soveta Scienco kaj Kulturo, varmesalutis la esperantistojn kaj gastojn. En la salutparolo ŝi emfazis la noblan laboron de la esperantistoj por paco kaj interkomprenigo inter la popoloj en la mondo.

Prelegon je temo „La E-movado en USSR“ faris la heroo de socialisma laboro Nikola Aleksiev. Li funde sekvis la estiĝon kaj evoluon de la sovetaj E-movado, substrekkis ĝian kontribuon por stabiliĝo de la sovetaj ŝtato kaj diskonigo de la veropri la nova socialisma vivmaniero en USSR. Per sia agado ĝi starigis kontaktojn kun esperantistoj el multaj landoj, inkluzive el Bulgario. La preleginto detale traktis la evoluon de la ligoj inter la bulgaraj kaj sovetaj esperantistoj en la pasinteco kaj nuntempe.

Je la nomo de la kunveno estis aprobita teksto de gratulotelegramo la al Asocio de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo, konekse kun la rimarkinda jubileo.

Aristo GELEBOV

Merita jubileulo

La esperantistoj en Ruse solene celebris en septembro pasintjara la 80-jaran naskiĝtagon de Stefan Popov — sindona kaj nelacigebla aktivulo de la urba E-societo „Libero“ kaj de la DE de BEA en Ruse. Pri la vivo kaj E-agado de la jubileuloparolis Nadeĵda Sirkova, membro de la CE de BEA.

Stefan Popov naskiĝis en vilaĝo Ĉervena Voda, distrikto de Ruse. En 1920 kiel gimnaziano li entuziasme eklernis la Internacian Lingvon. Popov estis instruisto, advokato kaj jurkonsilisto. Post sia pensuiliĝo li eklaboris pli aktive por Esperanto. Proksimume 12-jarojn Stefan Popov estis kasisto da E-societo „Libero“. Nun li respondecas pri la kaso de DE de BEA en Ruse. Ekde 1972 Popov estas membro de CE de BEA.

Li faris multajn prelegojn antaŭ esperantista kaj neesperantista publiko, gvidis dekojn da E-kursoj, verkis artikolojn pri Esperanto. Stefan Popov kelkfoje gajnis premiojn en la literaturaj konkursoj de revuo „Bulgara Esperantisto“.

Ni hondeziras al la jubileulo sanon, vignecon kaj aktivan E-agadon.

Boris KAVALLIEV

Dankletero al IEK

La Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) en Sofio organizas por bulgaroj kaj eksterlandanoj korespondaj kursojn por lernado de Esperanto.

La korespondada formo de lernado havas vicon da avantaĝoj. Ĝi donas eblecon lerni la lingvon hejme kaj dum tempo konvena por la kursano.

La instruado estas trigrada: unua grado — por komencantoj, dua — por progresintoj kaj tria — por perfektigoj.

Post preparo de la koncernaj lecionoj la kursano sendas la respektivajn kontrolekzercojn. Ili estas kontrolataj kaj resendataj kun la necesaj indikoj.

Aliĝo al la kursoj eblas ĉiutempe — ekzistas neniam templimoj.

Unu el la eksterlandaj kursanoj estas la sovetaj samideano Petr Tenenbaum el urbo Krasnodar. Li tre regule kaj akurate studas la Internacian Lingvon. Krom siaj kontrolekzercoj, inkluditaj en la programon, li tradukis propravole libreton, kiun plezure kontrolis lia kurskontrolanto samideano Mihail Elenov el Sofio. Antaŭnelonge IEK ricevis leteron de samideano Petr Tenenbaum, en kiu li esprimis sian dankon pro la okazigo de tiuj ĉi utilaj E-kursoj. Jen kion li skribis:

„... Mi sendas la daŭrigon de la tradukita libreto „Sano, emocioj, beleco“ de S. G. Ajrapetov. Mi kore dankas la kontrolinton de la unua parto de suprenomita tradukaĵo. La rimarkoj kaj la evidentaj eraroj sendube helpas al mi daŭrigi sukcese la studon de Esperanto kaj profundigi min en ĝiajn subtilaĵojn. Laŭ mia opinio, la sofiaj internaciaj korespondaj kursoj de Esperanto uzas ĝustan metodon kaj dankal tio ili estas bonega perfektigilo. Bonvolu, do, permesi esprimi al vi mian koran dankon kaj profunda rekonon.“

Vasja PETROVA

Ni kondolencas

La 20-an de oktobro 1982 forpasis Marko Vasilev Bliznakov, 88-jara, el v. Leŝnica — Loveĉ-distrikto.

Li naskiĝis en 1894. Finlerninte gimnazion en Pleven, Bliznakov ekoficis kiel instruisto en v. Leŝnica. Lia E-agado komenciĝis en la lernejanaj jaroj. Marko Bliznakov havis viglan korespondadon kun geesperantistoj el Francio kaj aliaj eŭropaj landoj.

Niajn sincerajn kondolencojn al lia familio!

En sia 87-a jaro, la 13-an de novembro 1982 en Trojan forpasis Minko M. Conkovski — unu el la meritaj E-veteranoj, kuzo de Minko Ivanov Conkovski — administra sekretario de revuo „Scienca Mondo“.

Entuziasmigita de la ideo pri frateco, amikeco kaj paco inter la popoloj, li eklernis Esperanton jam en 1911. Dum lia internigo pro komunista agado en Petriĉ, Conkovski instruis Esperanton al la proskribitoj.

Ĝis la lasta spiro li restis sindona esperantisto. La geesperantistoj el Trojan perdis imitindan samideanon.

Ni respekte kliniĝas antaŭ lia memoro!

Sur la unua kovrilpaĝo: Mi diros al vi iun sekreto!...

Foto: Lote Mihajlova

VINTRO, MONTARO, SPORTO...



La neĝo estas ĵus falinta kaj miloj da ŝatantoj de la vintraj sportoj sin direktas al la bulgaraj montaroj. La stacioj por skisporto disponigas al la skiistoj ĉion, pri kio ili povus rezi: modernajn hotelojn, skikurejojn, ski-liftojn kaj ski-riparejojn. Se vi estas ankoraŭ novico en la skisporto, vin zorgeme helpos ski-trejnistoj. Kaj jen — vi faras viajn unuajn paŝojn en tiu belega kaj emocia vintra sporto!...

Ni komencis nian vintran ekskurson tra la bulgaraj altmontaraj stacioj vizitinte unue BOROVEC. Ni ne restis longan tempon en la modernaj hoteloj „Bor“ „Edelvajs“, „Musala“, kiuj proponas komforton kaj distrojn, ĉar la skikurejoj de Borovec nin vokis. En tiu parto de Rila-montaro estas 15 malsamaj skikurejoj — por ĉiuj ŝatantoj de la skisporto — junaj kaj maljunaj, komencantoj kaj spertaj skiistoj. La skikurejoj Sitnjakovo, Cerveno Zname, Jastrebec, Borovec

I, II, III, k. a. disponas pri iuj el la plej modernaj en Eŭropo ski-liftoj. La ŝatantoj de Borovec povas ĝui la belecon de tiu sportcentro kaj ripozloko de la komenco de novembro ĝis la fino de aprilo.

Iom pli suden, en Rodopimontaro, troviĝas alia altmontara stacio — PAMPOROVO. Ofte la turistoj kaj la skiistoj serioze neziĝas pri sia elekto: ĉu Borovec aŭ Pamporovo? Ambaŭ havas siajn avantaĝojn, sed verdire en Pamporovo neĝas pli ofte kaj la neĝavolo atingas dikecon de pli ol 3 metroj. La klimato estas sufiĉe milda pro la penetro de aerfluo el la Mediteranea regiono. Pamporovo distancas je 240 kilometroj de Sofio kaj je 84 km de Plovdiv, de kie la internacia ŝoseo E5 devias suden. Pamporovo situas je alteco de 1650 metroj super la marnivelo meze de maljunegaj pinarbaroj, tranĉitaj de largaj herbejoj. Vintre tiun montaran stacion vizitigas turistoj kaj ŝatantoj de la skisporto el ĉiuj mondpartoj. La komforto en la hoteloj kaj la ripozdomoj faras la restadon vere agrabla. La bonege organizita aŭtobusa transporto ebligas al la vizitantoj rapide atingi la skikurejojn en la ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ en Pamporovo estas ĉiuj kondiĉoj por agrabla skiado kaj ekskursoj. Proksime de Pamporovo, en vilaĝo Pisanica, troviĝas la Internacia Esperanto-Kursejo, kiu funkcias tutjare kaj krom lernado de la Internacia Lingvo disponigas al la lernejoj ankaŭ favorajn kondiĉojn por vintraj sportoj.

Oni povas renkontiĝi kun la beleco kaj la komforto ankaŭ de aliaj altmontaraj ripozlokoj en nia lando: en Pirin-montaro, en la regiono de montopinto Vihren; en Rila-montaro, en la belega regiono de montopinto Maljovica, kaj en Vitoŝa-monto apud Sofio. Per aŭtomobilo en unu horo oni povas de la centro de Sofio atingi la bazon de montopinto Cerni Vrah, kie estas modernaj skikurejoj kun ski-liftoj, komfortaj hoteloj kaj pitoreskaj montodomoj. Sur Vitoŝa troviĝas la kun ununura en nia lando montodomo „Esperanto“.

La bonegaj kondiĉoj por vintra sporto allogas multajn alilandajn turistojn dum ĉiuj sezonoj. La bulgaraj altmontaraj stacioj estas jam bone konataj eksterlande. En diversaj periodoj de la vintra sezono oni organizas grandskalajn internaciajn skikonkursojn. Antaŭ du jaroj en Borovec okazis la Internaciaj Skikonkuroj por la Monda Pokalo pri Alpaj Disciplinoj kun la partopreno de mondfamaj skiistoj.

La vintra sporta kalendaro ĉi-jare abundas je novaj interesaj eventoj kaj skikonkuroj pri ĉiuj ski-disciplinoj en ĉiuj bulgaraj altmontaraj ripozlokoj.

Sed ni ne parolu nur pri ski-sporto. Niaj belegaj montaroj allogas ankaŭ la ŝatantojn de vintra turismo kaj alpinismo kaj estas vera paradizo por la infanoj kaj la junularo dum la vintraj ferioj.

Kaj ĉu vi ne preferus agrablan ekskurson per glitveturilo al iu bulgara vilaĝo kie vi povas ĉeesti iun el la multaj vintraj folkloraj festoj kaj ĝui aŭ eĉ mem danci la viglajn bulgarajn popoldancojn „horu“ kaj „raĉenica“?

D. SIMEONOV

Cefredaktoro: Donĉo HITROV

Vicĉefredaktoro: Haim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI, prof. Vasil COCOV, Dimitar HAGIEV, Krastju KARUCIN

Administranto — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO

Bul. Hristo Botev, 97,

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Stata Presejo „G. Dimitrov“, bul. Lenin“ 117

P. K. 66

1000 Sofio